

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 3 2008

Vendredon la 29an de aŭgusto

56a jaro

Kalendaro

(Kie? kiam? – vd. ĉi-malsupre)

Mardon la 2an de septembro (semajno / uke 36) – *tirsdag*

Tri niaj membroj, Kjell Peder Hoff, Snorre Benum kaj David Welsh, partoprenis en la ĉi-jara Universala Kongreso en Rotterdam – kune kun 1842 aliaj el 73 landoj. Ili raportos pri siaj diversaj impresoj.

Tre av medlemmene våre, Kjell Peder Hoff, Snorre Benum kaj David Welsh, deltok i årets verdenskongress i Rotterdam – sammen med 1842 andre fra 73 land. De forteller om sine forskjellige inntrykk.

Lundon la 15an de septembro (semajno / uke 38) – *mandag*

Tri niaj membroj, Heming W. Thorbjørnsen, Raymond Johansen kaj David Welsh, partoprenis en la Internacia Junulara Kongreso (IJK) en la okcidenthungara urbo Szombathely. Ili parolos al ni pri siaj travivaĵoj tie.

Tre av medlemmene våre, Heming W. Thorbjørnsen, Raymond Johansen og David Welsh, deltok i årets internasjonale ungdomskongress i den vestungarske byen Szombathely. De forteller hvordan de opplevde det.

La datoj de la postaj kunvenoj dependos de la rezultoj de la enketo kiun vi ricevas kun ĉi tiu *Bulteno* / ricevis retroŝte lastsemajne (22. aŭgusto). La limdato por resendo estas lundo la 8a de septembro (semajno 37).

Postpaŭze, ĉiukunvene: Lingvaj demandoj. (Kunportu la viajn!)

Språkspørsmål etter pausen på hvert møte. Ta med dine!

Kunvenejo: Olaf Schous vei 18 (enirejo Schouterrassen), 0572 Oslo.

Buso 31 aŭ tramo 17 al Rosenhoff kaj iru supren laŭ Båhusveien – aŭ malsupren de Sinsen T (buso, metroo) / Sinsenterrassen (tramo).

OKAZIS

Mardon la unuan de aprilo.

La klubaj reprezentantoj en la domkomisiono prezentis siajn ĝisnunajn planojn por renovigo de Esperantonia. Ni konsentis ke necesas refarbi la nun flavajn murojn pro varia heleco de la nuna koloraĵo, sed ne estis konvinkitaj ke necesas refarbi ankaŭ la brunan vandon ĉe la frizejo. Ni ankaŭ skeptikis pri la ideo starigi novan vandon antaŭ la kuirejo. Pri la bezono forigi la librobretarojn por liberigi iom(ete) da spaco, ni pensis ke konvenos sondi la dezirojn de luontoj mem. Ni diskutis ankaŭ ĉu realigeblos – ekonomie kaj praktike – interreta kafejo

Lundon la 21an de aprilo

La diskuto pri vegetarismo estis neformala, pro malsano de la gvidunto.

Mardon la 5an de majo La anoncita

KIEL oni povas lerni Esperanton en la reto? Cato klarigis tion al la klubanoj : **Mardon la 3-an de junio** Cato ofertis informplenan prezentadon pri la retejo <http://no.lernu.net/> Li prezentis al la ĉeestantoj detale ĉiajn aspektojn de tiu retejo. Unue, ĝi proponas kursojn, ekzamenojn, lernilojn por Esperanto en multaj lingvoj. Sed ĉar oni lernas Esperanton ne nur por lerni Esperanton, *lernu.net* ankaŭ disponebligas tujmesaĝilon, retbildkartan servon, bibliotekon kaj eksterajn ligilojn al tre interesaj retejoj de la Esperanto-mov-

programo ne okazis, ĉar poŝtelefona esploro rivelis ke la prelegunto ankoraŭ troviĝas en aviadilo survoje hejmen de Barato.

Lundon la 20an de majo

Nun ni havis duoblan programon: la prokrastitajn impresojn de Leif Arne pri lia trimonata restado en Barato kaj la anoncitan raporton pri lia partopreno en la Internacia Seminario kaj la komitatkunsido de TEJO. Li opiniis ke la vivo de TEJO nun renormaliĝas, post la elekto de nova estraro, kiu ne povis okazi dum la IJK en Vjetnamio lastsomere, pro nesufiĉa partopreno. Siajn impresojn pri Barato – precipe Guĵurat kaj Kerala – li ilustris per bildoj en sia portebla komputilo. Plej impresis lin la forto de la loka kulturo kun ties apartaj manĝaĵoj, lingvoj kaj religiaj tradicioj.

Raportis Douglas

ado. Ni povis vidi, ke finfine, tiu ankaŭ estas tre interesa amikumilo. Rehejmenirinte, mi serĉis pri la norvegaj uzantoj de *Lernu*. La rezulto : ili estas ĉirkaŭ 240!

Lundon la 16an de junio

Ĉi-kunvene Heming nin ludigis per kelkaj paroligaj Esperantaj ludoj. Interalie argumenti kaj debati inter du grupoj pri la temo : "ĉu la kaĉo estas plej bona sabate aŭ dimanĉe?" Se al vi la temo povas ŝajni stranga, aŭ eble ne interesa kaj malfacile debati pri tio, vi

eraras: la debato fakte fariĝis tre interesa, gvidis nin al demando pri "spiritualaĵo kaj materialaĵo". Ni finis kun neŭtrala vidpunkto, post kulturaj intersanĝoj. Alia ludo temis pri aldono de ĉiam nova vorto al fino de frazo. Ni ege amuziĝis, vidante ke esperanto ebligas fari tute nekredeblajn (tamen

korektaj) konstruaĵojn.

La kunveno finiĝis per diskuto pri tiuj ludoj, kiuj ŝajnas leĝeraj, sed estas taŭgaj lingvaj lern- aŭ praktikiloj. La propono de Douglas ludi unu el tiaj ludoj dum ĉiuj kunvenoj estis fervore akceptita.

Raportis Nicolas

Someraj vizitoj

Kiel kutime, ni havis plurajn tre agrablajn vizitojn de eksterlandaj esperantistoj dum la somero.

Finstudinte politikan sciencon, Ben Indestege el Limburgio /Belgio volis esplori kia estas la vivo de la loĝantoj en diversaj landoj de Eŭropo, do li aliĝis al Pasporta Servo kaj petveturis de Bulgario tra Rumanio, Hungario, Ĉeĥio, Pollando, Baltio kaj Finnlando ĝis Tromsø kaj revene tra Nordland kaj Svedio al Oslo, kie li renkontis sian amikinson el Belgio, kaj kune ili feris en la okcidento.

Aare Metsamärt el Estonio jam vizitis Norvegion en 1993, kiel gasto de Arnljot Kyllingstad en Rogaland. Li revenis nun kun edzino kaj vizitis malnovajn amikojn en la okcidento.

Bengt Nordlöf estas unu el la praaktivuloj de la granda E-kursejo en Lesjöfors. Li venis per sia loĝaŭto kun amikino Vajda el Litovio, kaj ili kunhavis multajn – sed ne nur bonajn – novaĵojn el la E-movadoj de siaj respektivaj hejmlandoj.

Surprizan sed tre agrablan viziton ni havis unu dimanĉon posttagmeze, kiam aperis ĉe la pordo tute neatendite Astrid kaj Erik Birkbak, veteranaj fervojistoj el Køge apud Kopenhago.

Pli bone anoncita estis la vizito de Marika Frense, nova teamano de la floranta E-centro de Herzberg (Harz, Germanio). Kelkaj klubanoj venis por aŭdi pli pri tiu famiĝinta "Esperanto-urbo".

Kaj ne venis al Esperantonia, tamen plurajn horojn restis en la urbo tuta busanaro survoje de la Universala Kongreso en Nederlando hejmen al Moskvo – kaj diversaj aliaj lokoj en la tuta Rusio. Al ili montris la vidindaĵojn de Oslo nia profesia (emerita) ĉiĉerono, Kari Kalsås.

Laste revenis post flugo al Tromsø kaj migrado en la okcidento Xosé Conde kaj Anna F. el Katalunio. Ili restis plurajn tagojn kaj funde esploris la kulturan vivon de Oslo.

– Restu hejme kaj per Esperanto renkontu la mondon!

Douglas

Ŝanĝoj en Esperantonia

Pluraj el tiuj ŝanĝoj, kiujn ni anoncis en *Kluba Bulteno 2*, realiĝis dum la somero, danke al klubana kunlaboro en pluraj semajnfinoj, kiun organizis Cato Haugen:

- * Ĉiuj muroj kaj vandoj de la kunvenĉambro estas lavitaj kaj farbitaj blankaj – ankaŭ la vando de la frizista salono, kiu antaŭe estas bruna, la kuirejaj ŝrankoj kaj la plafono.
- * La planko estas vaksita / *bonet*.
- * Nova ŝranko estas muntita super la lavmaŝino, en la angulo inter la du jamaj, kie antaŭe estis nur malfermaj bretoj.
- * Tri pliaj lampoj estas muntitaj en la plafono kaj ankaŭ granda ventumilo
- * La librobretaroj estas forigitaj. Unu nova estas starigita por la vendotaj libroj (tiuj de la nun malfondita Eldonejo)
- * La bibliotekaj libroj estas provizore forpakitaj
- * La vestejo estas nun en la kunvenĉambro, malantaŭ la kolono

La domkomisiono planas nun

- * forigi la tapiŝon en la ŝtuparo kaj en la antaŭa vestejo
- * munti en la antaŭa vestejo novan bretaron por la klubbibliotekaj libroj

DD

Nia libro-ekspoziceto staras nun en la Deichman-filio de Torshov kaj restos tie dum la tuta septembro. Post tio ĝi mendeblis por **via** loka biblioteko.

(Misskribo en *KB* n-ro 2, p.4: ekspoziceto —> ekspozicieto)

Korekto al la membrostatistiko (en la jarraporto 2007), post kiam (maje 2008) 4 membroj ankoraŭ ne pagis por 2007, malgraŭ du lastaj avertoj.

En 2007 (2006) la klubo havis 77 (86) pagintajn membrojn. El ili estis 16 (15) junulaj

La informbudo en Skedsmo (anoncita en *KB 2*) bedaŭrinde ne povis okazi, pro forvojaĝo de la kontaktulo.

Tlf. 22 35 08 94 www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: [oficejo\[a\]esperanto.no](mailto:oficejo[a]esperanto.no)
Poŝtĝiro 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL 0533 05 22870).

Ĉi tiun *Bultenon* prizorgis Douglas Draper